

NEDERLANDA KATOLIKO

Maandblad, officieel Orgaan van den Nederlandschen
R.K. Esperantistenbond „Nederlanda Katoliko”,
gevestigd te 's-Hertogenbosch.

Opgericht 29 Augustus 1909. Bisschoppelijk en Koninklijk goedgekeurd
Cio per amo, nenio per forto. (*S. Franc. de Sales*)

Geestelijk Adviseur LAMB. J. J. M. POELL

Abonnementsprijs f 1.50 per jaar Eksterlanda Jarabono f 2.—	Adres der Redactie : P. M. BROUWER Pahudstraat 134 's-Gravenhage.	Afzonderlijke nummers 20 cent. Advertentiën 30 cent per regel.
-------------------------------------------------------------------	----------------------------------------------------------------------------	-------------------------------------------------------------------------

Administratie : J. A. LEIBBRAND, Tilburg.

ESPERANTISTEN.

Er zijn in Nederland veel Esperantisten.

Er zijn er die, nadat ze de eerste beginselen van de taal onder de knie gekregen hebben, zich verder heel genoeglijk amuseeren met hun buitenlandse korrespondenten. Of ze weten uit hun Esperanto-kennis ook nog nut te trekken en worden prentbriefkaart- of postzegelverzamelaar.

Dit zijn de Esperantisten die Esperanto gebruiken voor zichzelf.

Er zijn er ook, die met de eerste beginselen van de taal niet tevreden zijn en zich geven aan een diepere, bredere studie van Esperanto. Zij zijn ook na het halen van A. en B. diploma niet tevreden en verdiepen zich in de taal: lezende, schrijvende, vertalende.

Dit zijn de Esperantisten die Esperanto gebruiken om de taal en waarden als taal.

Er zijn ook Esperantisten, die in Esperanto een middel zien, waarmee ze werkzaam kunnen zijn in dienst van de mensheid. Zij zijn de dragers van het ideaal: Verbroedering der Volken. Zij zijn de strevers naar een verre toekomst, waarin bestaanbaar zal zijn het voor de Wereldorde noodzakelijke eendrachtig samenwerken op maatschappelijk en politiek terrein. Zij willen met Esperanto overbruggen de kloof van het taalverschil, die nu nog bemoeilijkt, zo niet onmogelijk maakt, het ontstaan van de sfeer van onderling vertrouwen en wederzijdse waardering, ook daar, waar reeds aanwezig is de goede wil.

Dit zijn de Esperantisten, die Esperanto gebruiken zoals ze ook werkelijk gebruikt moet worden: in dienst der mensheid.

Waar de eersten ook buiten elke organisatie hun doel: zich zelf, kunnen bereiken, daar gevoelt de laatste groep de noodzaak van een sterke organisatie. Zij vormen de gelederen en sluiten zich aaneen. Zij trekken samen op, sterker door elkanders steun, zekerder door elkanders vertrouwen.

In Nederland zijn vele Esperantisten. Ook Esperantisten die Katoliek zijn. En daaronder nog velen, die leven in isolement, genoeglijk korresponderend en vruchtbaar verzamelend.

Maar N.K. heeft nodig Katolieke Esperantisten, die, om de Universaliteit van hun Kerk, krachtens hun Katoliciteit, zich met Esperanto dienstbaar maken aan de internationale belangen van die Kerk en helpen aan de verspreiding van haar onvergankelijke beginselen, die alleen het wankelend aanschijn der aarde zullen kunnen vernieuwen.

Esperantisten die ook Katoliek zijn, wordt Katoliek Esperantist. Nederlanda Katoliko heeft U nodig.

VAN HET HOOFDBESTUUR.

I. AFTREDENDE LEDEN VAN HET HOOFDBESTUUR. VERBETERING.

Aan de beurt van aftreden zijn 5 leden: 1. F. Marvee. 1. J. A. Leibbrand. 3. H. Penders. 4. Pater C. Preller. (Deze stelt zich niet meer herkiesbaar.) 5. J. H. Westen.

In het Februari-nummer werd abusievelijk vermeld, dat de Heer Westen niet meer in aanmerking wilde komen voor de functie van Hoofdbestuurslid. Dit is onjuist. De Heer Westen blijft candidaat voor het Hoofdbestuur, maar heeft alleen ontslag genomen als 1ste Secretaris van N.K.

Er is dus maar één vacature voor het Hoofdbestuur.

II. ONZE GEESTELIJKE ADVISEUR.

Tot ons genoegen hebben wij gelezen dat onze Zeereerw. Adviseur het ziekenhuis te 's-Hertogenbosch heeft kunnen verlaten.

Moge hij spoedig en volledig hersteld zijne werkzaamheden weder met nieuwe kracht kunnen hervatten. Dat geve de goede God!

III. BESTUURSVOORSTEL CONTRIBUTIEVERHOOGING

Bij dit voorstel ontbrak in het Februari-nummer de toelichting. Hier volgt ze:

Gezien het feit, dat er iets meer van den Bond gevraagd wordt dan een orgaan van 12 of 16 pagina's, en dit orgaan noodzakelijk uitbreiding behoeft tot minimum 20 pagina's is het noodzakelijk dat de daarvoor bestemde uitgaven kunnen bestreden worden.

Thans kost ons orgaan van 20 pagina's pl. m. 10 cent per ex. Dit bedraagt per f lid 1,20 per jaar, waarnaast nog 25 cent per lid moet worden afgedragen aan I.K.U.E. zoodat er practisch 5 cent per lid en per jaar overblijft, waarvan alle onbosten moeten worden bestreden, wat ten eenemale onmogelijk is.

Ook het abonnement van ons orgaan dient verhoogd te worden van f 1,50 op f 3,50 per jaar, opdat men zich niet opgeve als abonné voor een lager bedrag dan het lidmaatschap bedraagt.

AFDEELING EINDHOVEN. „SUDA KRUCO”.

Candidaten voor het Hoofdbestuur :

1. P. Ch. M. van de Vijver. Eindhoven.
2. J. A. de Roos. Eindhoven.

AFDEELING EINDHOVEN. „SUDA KRUCO”.

Exploitatiekosten Orgaan van N.K. te verzachten door een goed opgezet systeem van Advertentiecolportage.

AFDEELING TILBURG. „AME KAJ PACE”.

Candidaten voor het Hoofdbestuur :

1. F. Marreeve. <Afr.>
2. J. A. Leibbrand. <Afr.>
3. H. Pendets. <Afr.>
4. J. de Roos, Eindhoven.
5. P. v. d. Vijver, Eindhoven.
6. L. Weijts, Bergen op Zoom.

AFDEELING GEMERT. „NIA IDEALO”.

Er bij den Minister van Onderwijs, Kunsten en Wetenschappen op aan te dringen, dat Esperanto opgenomen wordt onder de leervakken voor Lager Onderwijs.

AFDEELING GEMERT. „NIA IDEALO”.

Candidaten voor het Hoofdbestuur :

1. Zeereerw. Heer J. Sanders, waarn. Pastoor te Gemert-
< In de vac. Pater Preller).
2. M. T. Aerds, Eindhoven.

AFDEELING 's-GRAVENHAGE „PORDIO KAJ EKLEZIO”

I. Na artikel 12 van het jeugdreglement worde een nieuw artikel

bijgevoegd, n.l.: in plaatsen, waar geene afdeeling van N.K. is, voorziet het bestuur occasioneel.

II. In plaatsen, waar reeds een afdeeling van N.K. gevestigd is, kan N.K. slechts nieuwe leden aannemen door middel van deze afdeeling.

EXAMENS. (OFFICIEËL)

In aansluiting op het bericht in het Februari-nummer, betreffende de plaatsen en de data der te houden Esperanto-examens in het jaar 1932 volgen hier nog eenige mededeelingen.

De examengelden bedragen:

Voor kandidaten diploma A.

3 Gulden voor hen, die als lid zijn aangesloten bij:

L.E.E.N. — N.K. — L.F. — N.C.E.V. — N.O.S.O.B.E.

5 gulden voor andere personen.

Voor kandidaten diploma B.

Respectievelijk 5 en 10 gulden.

Geslaagde B-candidaten storten **daarna** nog f 2,50 voor het diploma.

Aanmelding tot de examens bij den Secretaris:

H. J. BULTHUIS, Kamillestraat 37, 's-Gravenhage. steeds uiterlijk 14 dagen vóór elk examen, onder storting van de examengelden, per postwissel of per giro No. 174620, met vermelding van: naam, voornamen (**voluit**), plaats, jaar en datum van geboorte, tegenwoordige woonplaats en lid van welke Esperanto-vereeniging.

Candidaten, die 14 dagen vóór de examens de examengelden niet hebben gestort, zullen niet worden opgeroepen.

Bewijs van lidmaatschap moet desverlangd worden overgelegd gedurende de examens.

De Secretaris,
H. J. BULTHUIS

UIT DE AFDELINGEN.

WORMERVEER

IN MEMORIAM

Het nieuwe jaar zette voor onze club al bijzonder droevig in door het overlijden van een harer beste leden, mamelijk den Heer J. H. KOPER.

Voor onze toch al kleine groep, beteekent dit overlijden een gevoelig verlies, daar de Heer Koper iemand was, die nooit man=

keerde op de bijeenkomsten der club en steeds met ijver Esperanto propageerde.

Wij zullen hem in onze gebeden blijven gedenken.

LI RIPOZU EN PACO.

ROTTERDAM

RAPORTO

La 16a de la pasinta monato restos memorinda tago por la Esperantistaro en Rotterdamo.

Nia klubo „La Katolika Stelo” tiun tagon grandioze aranĝis Esperanto-propagandfeston, kies celo unue estis plivigli la klubviva kaj due plientuziasmiĝi nian urbon skeptikan rilate Esperanton.

La du aliaj ĉi tieaj Esperantistaj grupoj, „Mercurio” kaj „La Espero” estis oficiale invitataj, kiel ankaŭ ĉiuj geurbanoj, interesigantaj koncerne nian lingvon. Inter multaj ni ankaŭ rimarkis diversajn kursanojn de la Popol-Universitato kaj kelkajn anojn de la Haga grupo „Por Dio kaj Eklezio”.

La de ni elektita salono (t Gouden Hoofd) estis guste ornamita per diversaj flagoj, priesperantaj aliŝoj, verdaj steloj, rubandoj ktp., kiujn la reprezentanto de la Centra Nederlanda Katolika Esperanto Librejo en Eindhoven, kiu mem ĉeestis la feston, bonvole cedis al ni. Sur granda tablo ankaŭ estis montritaj bela libro-trezoro kaj ĉiuspecaj Esperantaj, kunportitaj de la gvidanto de la ĉi supre menciita Katolika Librejo, kiun ni estas tre dankaj pro lia efektive aktiva kunhelpo.

De la 7^{1/2} ĝis la 8^{1/2} horoj konstante la gajaspekta salono pli-kaj pli pleniĝis ĝis fine ĉirkaŭe 300 personoj troviĝis en la salono.

Post kiam la kunveno estis malfermita de nia tre agema prezidanto, kiu bonvenigis kelkajn personojn kaj aliflanke dankas kelkajn pro ilia senprokrasta kunlaborado, la festo komenciĝis kun la kantado de la alkuraĝiga himno „La Espero” Post kelkaj deklamadoj kaj kantoj, la ĉeestantaro malpacience atendis Sron. P. Heilker, kiu faros holandlingvan paroladon pri la utilo k.t.p. de Esperanto. Kaj vere, iom post la naŭa aperis la tiel ŝatata samideano. Kun surdiga aplaŭdado li estis ricevata. Lia parolado precipe temis pri la motivoj de la naskiĝo de Esperanto kaj pri ĝia evolado.

La parolinto koncize skizis al ni la nuna amplekso de la movado, per nerefuteblaj faktoj li montris la progresojn de Esperanto tra la tuta mondo. Fine li dediĉis kelkajn vortojn al tiuj Esperantistoj kiuj ĝis nun estis neorganizitaj, kiuj ankoraŭ ne aliĝis al ia klubo, kiuj ankoraŭ ne estis abonintaj ian gazeton, kiuj ĝis nun forgesis mendi almenaŭ po unu libro ĉiujare okaze de la librotago (15—12) k.t.p.

Par vervaj paroloj li instigis tiujn, kiuj legas kaj pristudas Esperanton en la familia ĉambro, plej volonte tuj apud la agrable varma forno kaj kiuj ne atentis la gravegan taskon plenumendan. Sendube

multaj sentis sin kulpaj, sed ĉiuj koroj verdaĵ estas plenigitaj de flamanta entuziasmo por nia movado kaj la efiko de tiu instiga parolado eksterdube montriĝos en Rotterdamo. La organiza-komitato ĉi kune denove esprimas sian plej sinceran dankon al li pro lia senhezita kunlaborado al la sukcesigo de nia vespero.

Post la paŭzo kelkajn deklamaĵojn ktp. oni prezentis. Poste Sro. Sigismundo Pragano (Rumano, gvidanto de la Ĉe-kurso ĉe la Roterdama Popol-Universitato) tre sprite paroladis kaj multfoje oni ne povis reteni la altrudiĝajn ridojn. Per vivplena aplaŭdado oni lin dankis.

Unu el la lastaj numeroj estis la komika teatraĵo, titolita: „Tie ĉi oni parolas Esperante“. Ĝi estis pristudita de la teatro-klubo de „La Katolika Stelo“. Ankaŭ ĝia sukceso estis abunda kaj la farita peno estis danke rekompencata.

Je la 12^{1/2} la festo finiĝis kaj la plimulto hejmeniris. Tiam la balo komenciĝis kaj la gajeco triumfis. Proksimume la 2an dimanĉmatene la lastaj iris serĉi la liton.

La vespero fariĝis grandegan sukceson kaj la agrablaj okazintaĵoj sendube tiel fortike memorfiksiĝis en la kapoj de la Roterdamaj geesperantistoj ke ili certe longan tempon restos neforviŝeblaj.

Je la nomo de la sekretariino
E. WENSING.

UIT DE ESPERANTO BEWEGING.

ESPERO KATOLIKA.

De „Centrale Ned. Kat. Esp. Boekhandel“ te Eindhoven verzoekt ons mede te deelen, dat zij niet fungeert als „peranto“ voor „Katolika Vivo“, of welk blad dan ook wordt uitgegeven of in de toekomst zal worden uitgegeven door Pastro Ramboux te Parijs, maar alléén en uitsluitend deze functie zal blijven waarnemen voor het *officieele* orgaan van I.K.U.E., thans verschiĵnende onder den naam „Espero Katolika“, onder redactie van Pastro G. Font Giralt.

IEDER ESPERANTIST

drage minstens één steentje bij voor het Zamenhof=Monument.

Dus ook ieder N.K.=lid.

Postrekening 82984.

F. MARREVEE, den Haag.

GRAVA NOVAJO!

Ciam oni diskutas pri la elparolado de nia mondhelplingvo. Oni ne nur diskutas pri tio, sed oni tamen malpacientiĝas.

Nun tamen la problemo estas solvita. Dum la kvina Esperanto-kongreso en 1909a paroladis nia Majstro kaj de tiu parolado oni faris vaksajn cilindrojn.

Antaŭ kelkaj tagoj aperis gramafondisko, kiu do diras al ni kiamaniere Dro. Zamenhof elparolis sian lingvon.

Jen dokumento por la elparolado.

La disko estas havebla ĉe la Centra Nederlanda Katolika Esperantolibrejo en Eindhoven je 4 guldenoj.

Ĉiu do kiu iam interbatalis pri la elparolado nun havigu al si tiun netakseblan trezoron.

J. A. DE ROOS.

WAAR ESPERANTO DIENST ZOU BEWIJZEN.

In de Maasbode van 20 Febr. 1932 (Ochtendblad) staat te lezen: „De volkenbondsraad is vanmiddag (19 Febr) weer bijeengekomen om de toestand te bespreken, die in Shangai ontstaan is door het ultimatum van Japan..... Er is geen tijd meer te verliezen want om middernacht Geneefsche tijd (dus 11.20 Amst. tijd) loopt het Japansche ultimatum af. Het was intusschen *met alle vertalingen van de redevoeringen* reeds bijna acht uur Geneefsche tijd geworden.”

Men schijnt er met de diplomatieke taal (Frans) noch met de „wereldtaal” (Engels) te komen. Waarom blijft men blind voor de hulp die Esperanto hier zou kunnen bewijzen??

.....

In hetzelfde blad ziet men een foto met het onderschrift: SPRAAKVERWARRING. Men heeft er iets op gevonden. De redevoering gaat via een tolk, en iedere afgevaardigde is in staat het gesprokene naar verkiezing in het Frans of het Duits te volgen.

Wat zou die installatie kosten? En wat moet iemand doen, die geen Frans en geen Duits kent? En zouden de tolken zich nooit eens vergissen of minder juist vertalen?

Een proef met Esperanto zou minder kostbaar zijn, en zeker meer betrouwbaar.

ESPERANTO PERSDIENST.

Hetgeen de Nederlandsche pers in het afgelopen jaar gedaan heeft voor onze zaak verdient zeer zeker onze waardeering en gaarne zeggen wij haar dank daarvoor en wij hopen en vertrouwen dat ze ook in dit jaar onze zaak naar beste krachten zal steunen.

De door ons ontvangen artikelen zijn zoodanig dat een bespreking daarvan niet noodig is. Vereenigingsnieuws en eenige propaganda-artikelen zijn wel de hoofdzaken. Eén artikel wenschen wij even aan te halen, n.l. dat in de vergadering van den Bond van

Ned. Onderwijzers een voorstel van Arnhem om 't Esperanto als facultatief leervak in het 7e leerjaar in te voeren een zeer gunstig onthaal heeft gehad. In deze vergadering is tevens besloten een verzoek tot den Minister van O. K. en W. te richten om zoo spoedig mogelijk tot een staatsexamen te komen. Daar moet het inderdaad heen. De onderwijzers moeten onze taak voor een groot deel overnemen. Het gaat ook in dezen niet onbevredigend. Langzaam maar zeker komen wij er wel. Steeds meer onderwijskrachten komen in onze gelederen. Een vooruitgang van niet te onderschatten belang.

E. de W.

GEAMIKOJ!

Er is een betrekking vacant! Het klinkt wellicht vreemd, maar het is een feit. De werkzaamheden verbonden aan den Persdienst zijn mij, nu ik mederedacteur ben geworden van Nederlanda Esperantisto, eenigszins te zwaar geworden. Om den dienst naar behooren te laten blijven functionneeren is het dringend gewenscht, dat ik wat hulp krijg. Het werk zal in hoofdzaak bestaan uit de verzorging van de berichten voor de Nederlandsche Pers. Tot dit werk behooren het typen en cyclostileeren van de berichten, benevens de richtige verzending aan de bladen.

Wie van de Esperantisten wil mij helpen? Het liefst zou ik iemand uit Haarlem, Amsterdam of omgeving zich als helper of helpster zien aanmelden. Zulks om practische redenen. Mocht het niet mogelijk zijn iemand te vinden dicht bij huis, dan natuurlijk gaarne iemand van wat verder weg.

Gaarne, zeer gaarne zie ik aanmeldingen tegemoet. De Persdienst is een veel te belangrijk onderdeel voor de algemeene propaganda, dan dat hij door minder goed functionneeren niet aan zijn doel zou kunnen beantwoorden.

Zij die zich aan willen melden worden beleefd verzocht tevens te vermelden of zij in het bezit zijn van een schrijfmachine of de beschikking hebben daarover.

E. DE WOLF.

KION JUNA ESPERANTISTO SKRIBAS.

(Een jong Esperantist verzocht ons het door hem gemaakte opstel te plaatsen in N.K. Wij voldoen hierbij aan zijn verzoek.)

LA FILATELISTARO KAJ ESPERANTO

Mi hodiaŭ ion rakontos al vi pri la valoro de Esperanto por la filatelistaro. Ekzistas du specoj de filatistoj: la unuaj fariĝis filatelisto por akiri monon, la duaj por amuzi sin.

La unuaj ĉiel provas kolekti la plej valorajn poŝmarkojn laŭ metodo kiel eble plej malmultekosta.

Se ĉi tiuj estas lernintaj Esperantiston, ili povas korespondadi kun Esperantistoj, kiujn oni ĉie en la mondo trovas.

Tiel ili povas akiri, krom la diversajn poŝmarkojn sur la letero de siaj korespondantoj, ne malofte grandan kvanton da valoraj poŝmarkoj tute senkoste.

* Ja, la korespondanto, kiu la poŝmarkojn de sia lando konsideras kiel nemultvaloraj aŭ senvaloraj, tre volonte sendos al samideano tiujn poŝmarkojn, kaj certe se li per tio akiros poŝmarkojn el Nederlando, kiu por li estas fremda lando.

Vi vidas, kiel facile kaj nemultkoste la filatelisto, kiu estas lerninta Esperanton, povas akiri poŝmarkojn tre valorajn aŭ poŝmarkojn, kiuj fariĝos en la estonto tre valoraj.

Sed kion faras la filatelisto, kiu ne lernis Esperanton? Tiu pagas multajn sendkostojn (rekte aŭ nerekte), kaj ofte ankaŭ procentaĵon, kotizon por la filatelistunuigoj, monon, kiun ricevas poŝmarkborso. Sufiĉe.

Kaj kion pagas la filatelisto-Esperantisto? Poŝmarkon sur sia letero.

Kompreneble estas ankaŭ filatelistoj, kiuj scipovas diversajn naciajn lingvojn.

Sed tiukaze komparu:

Kiom estas la studkostaj por Esperanto? Kiom por naciaj lingvoj?

Esperantisto povas korespondadi kun personoj el la tuta mondo. Por aliaj filatelistoj estas la okazo por sia korespondado pli limigita.

Jen per kiel malgranda peno filatelisto ege profitas, se li lernas Esperanton.

Estimataj gesamideanoj, verŝajne vi havas vespere la okazon konversacii kun amikoj kaj parencoj, kiuj kolektas poŝmarkojn. Parolu tiam pri la profitoj nomitaj.

Sekvontan fojon mi skribos pri la dua speco de filatelistoj.

ST. WELLENS.

BERLINA „PATRO NIA”.

(Weltstadtbetrachtungen von Dr. Carl Sonnenschein, Notizen Heft 9.
El la germana lingvo tradukis P. M. Brouwer).

Preĝo en domaĉa! Preĝo en laboregejo! Preĝo en hospitalo!
Preĝo en malliberejo! Preĝo ĉe semajnfino!

„PATRO NIA”.

Ĉu ekzistas tio? ĝis nun neniu estis bona por mi. Mia patro drinkis! Mia patrino mortis en frenezulejo! Oni edukis min en la orfejo! En Pundomo mi ricevis punprokraston! Nur en la sunvarmo mi okaze sentis karesan manon! Al Vi do mi povas diri Patro!

Tio estas por mi nova sento! Ĉu la aliaj estas gefratoj? Mi havis fraton kaj fratinojn! Ili estas enterigitaj en la malriĉultombejon! Ĉe la enterigo froste malvarmis! Tiu ĉi malvarmo ne delasis de mi.

„KIU ESTAS EN LA ĈIELO”.

Tiom malproksima tiu ĉi ĉielo estas super nia urbo! Aliloke ĝi kovras per sia ora varmo ĝardenon kaj domon, etendas la varmajn manojn ĝis en la keloj kaj karese ĉirkaŭbrakas la mondon. En Berlino ĝi estas tiel malproksimega! Alia lando ĝi estas kun kiu ni ne havas interrilaton! La Sanktuloj, kiuj supreniris, estas kvazaŭ bravaj aviadistoj! Ni nur okule sekvas ilin! Ho, ke vi estu proksima de ni! Vi, malproksima, granda, eterna Dio!

„SANKTIGATA ESTU NOMO VIA”.

En mia ĉirkaŭaĵo ĉio estas nesankta! Mi nur konas kelkajn infanojn, kiuj restis senkulpaj! El iliaj okuloj ridas la Paradizo! Ili estas kvazaŭ floroj en printempo! Kiom baldaŭ ili velkos! Mi dum kelkaj jaroj konis mian patrinojn. Ŝi amis min! Per Sankta amo! Sed la frenezo enombriĝis la patrinojn! La aliaj havas malpurajn manojn! Aferhomoj! Monduloj! Ankaŭ piaj homoj! Kiom da egoismo loĝas en iliaj animoj! Tial mi en la frosta grizeco de la asfalta urbo forkuras al Via Sankteco! Mi volas per ambaŭ manoj levi ĝin super mian sorton! Mi volas esti ĉe Vi! En Via eterblanka pureco! Sur Viaj neĝblankaj pintoj! En la spiro de Via Justeco! Super ĉiuj nomoj de tiu ĉi mondo mi volas sanktigi Nomon Vian.

„ALVENU REGNO VIA”.

Malsuprenigu iun sonon el tiu alto al mi! Malsuprenvenigu pecon de via regno inter la fostojn de ĉi tiu urbo! En la ŝtonaro de la rivero alligu vian ankron! Sur Via ŝipo, ho Sinjoro, dimanĉefeste veturigu min trans la fluojn de la labortagoj! Ĉion en mi sopiras Lumon kaj Vivon! Ni vane klopodas per niaj sonĝoj plenigi la Ĉielon! Vi, kun Via Realeco, malsupreniru al ni! Via regno etendiĝu de la Ĉielo ĝis sur la tero! Ĝis Berlino! Alie la ĝardenoj ĉirkaŭe de ĉi tiu urbo estas sekiĝantaj dezertoj!

„FARIĜU VOLO VIA”.

Mi scias, ĉi tiuj ĝardenoj nur floras kiam Via leĝo fekundigas ilin! Krom tio, ĉio estas surogato! Ĉarlatanajo! Nura anstataŭajo! Ne ekzistas sistemo, laŭ kiu la mondo povas vivi, escepte Via Volo! Kiu estas, super ĉiuj inklinoj, ĉiuj reformoj, super ĉiuj parlament-programoj, la prabeleco de la mondo!

„KIEL EN LA ĈIELO, TIEL SUR LA TERO”.

En la lumo de viaj oceanoj silentas la ventegoj! Neniu Lucifero armite levas sian kapon kontraŭ Vi! Via Dekordono estas intern-strukturo de la ĉiela mondo! Ĝi vivas per Sia plenumiĝado! Ĝi ĝojkrias pro Sia brilo! La sekreto de la Tero tamen estas libereco! En la Libereco estas la kontraŭdiro! La sekreto de ĉi tiu urbo estas la perverseco! La forto por esti Sanktulo kaj por esti krimulo!

Ambaŭ loĝas en ĉi tiu urbo! Ĝi batalante provas Vian Leĝon!
Ĝi volas konfesi tion kun sanga frunto!

„PANON NIAN ĈIUTAGAN DONU AL NI HODIAŬ”.

Tiel ni estas ligitaj al la dependeco de la ekonomio! De la klara mateno ĝis la bruna nokto ni cerbumas pro nia pano! Pro la modesta ĉambro! Pro la semajna laborenspezo! Per konvulsiaj manoj ni akiras la nudan ekzistadon! La malsato de mil homoj formanĝas ĉiun spiriton! Kiu estas pli malgranda ol ni! Kiu pli al tero ligita! Sur la Galileaj kampoj staras la oraj lilioj! Pli elegante vestitaj ol Salomono! Super la deklivoj de la Tabor pendas la falkoj! Ili trovas sian grenon! Ni tamen vunda puŝas nin! Batalanta ĉirkaŭ la nutraĵujo! Ho Sinjoro, donu al ni nian ĉiutagan panon!

„PARDONU AL NI OFENDOJN NIAJN”.

Ni ne estas deterministoj! Ni scias ke Rousseau eraris! Ankaŭ ĉi tiu urbo ne nur estas fatalo! Ne nur situacio! Ne nur medio! Ankaŭ ĉi tie flagras la trivialeco! Ankaŭ ni portas en niaj neŝatataj manoj respondecon! Ankaŭ nin decas la esplorado de la konscienco! Ne ĝis ĉio la asfalto de nia urbo devigis nin! Ni povus esti venkintaj ĝin! Ni povus esti plantintaj liliojn en la malfermitan teron de ĉi tiuj stratoj! Kunstruitaj arkajojn super kelojn kaj kapelojn! Komponintaj el la ritmo de la maŝinoj gregorianajn kantojn. Ke ni perdis nian kredon, ho Sinjoro, estas kompreneble! Ne estas tute pardo- neble! Pardonu!

„KIEL NI ANKAŬ PARDONAS AL OFENDINTAJ NIAJ!”

Tion oni legas en la alegorio pri la mallidela servisto! De li la Sinjoro formetis milionojn! Li formetu kelkajn pfeningojn de la kunservisto! Sed li sufokigis lin. Li embarasigis lin. Ĝis la ŝuldo estu pagita! Tiamaniere nia preĝo estas timinda juĝo! Vi mezuros nin laŭ nia mezurilo! Ni ne povas veni kun malplenaj manoj! Ankaŭ en Berlino necesas la laboro al la interna homo! La memdisciplino! La sindeteno! La ekzercado! La pruvo de proksimumo! La dua ordono samvaloras la unuan! Vi ne volas religia sindono alvi mem, sen voli sociala sindono al la aliuloj.

„NE KONDUKU NIN EN TENTON”.

Ni volas esti Kristanoj! Ankaŭ en ĉi tiu urbo! Ankaŭ en la lavangventego de ĝia senreligienco! Ankaŭ en la glacia malvarmo de ĝia skeptikeco! Ankaŭ en la mizero de ĝia erarinklino! Ni volas esti fortaj! Ne jetu, ho Sinjoro, tro pezan ŝarĝon sur niajn ŝultrojn! Pesu ĝin laŭ nia malforteco! Ni portas pli malmulta ol Andalusio! Ol Palestino! Ol la malproksima Hindujo! Milobla dependeco tie estas pli konvena al la Kristaneco de la unuulo, de la familio, de la popolo! Nenie estas, kiel en nia urbo, la batalado tiel grava. Ne tro severigu vian leĝon, Vi Fortulo!

„SED LIBERIGU NIN DE LA MALBONO”.

Malfermu la superfluan de via Amo! La burĝonoj sur niaj branĉet

oj bezonas varmecon! La animoj en niaj malliberejoj Amon! La seka tero vian roson! Ĉi tiu mondo perdis la gepatran amon. Ĝi interŝanĝis la Patron por la organizanto, la komercisto, la politikisto! En la lumo de la Psalmoj staras la Juĝisto de la Malnova Testamento! Super la urbo pendas lia Tribunalo! Vi tamen estas senfina kompreno! Vi estas milobla Pardonon! Vi estas la Dio de la Bono! Vi estas nia Patro!

„AMEN”.

LA SANKTA VIZAĜO.

Estas en via koro iu bildo, kiun vi neniam povos forviŝi el ĝi. Kaj tiu bildo estas ne iu alia ol tiu, kiu estas presita en la ŝvitotukon de Veronika.

Estas delikata kaj ovala vizaĝo kaj la barboharoj nur iom ĉirkaŭas la mentonon.

Ĝia esprimo esta tiel severa, ke ĝi ektimigas, kaj tiel sankta, ke la malnova peko, kiu en ni havas siajn vastajn branĉojn, tremas ĝis en siaj radikfibroj plejfundaj.

Kaj la malĝojo, kiun ĝi esprimas estas tiel profunda, ke ni senvortiĝas, kiel infanoj, kiuj vidas sian patron ploranta, sen kompreno: li ploras!

La okuloj, kiuj suprenleviĝintaj, per unu ekvido estis kreantaj la Universon, nun estas duonfermitaj kaj amaraj larmoj elfluas ilin.

Sed rigardu, ho mia filo, la buŝon de via Dio, la buŝon, ho mia filo, de la Vorto.

Kian maldolĉecon ĝi gustas, kian vorton, nedireblan de ĝi mem, ĝi sentas.

Ĉar la lipoj estas je la dekstra angulo duone malfermiĝintaj ĝis doloran rideton.

Kiel ĝi, el sia tuta ekzisto, ploras kaj forfluigas la salivon kiel infano.

Ni ne plu bezonas panon, ho mia filo, tiomlonge ĉi tiu doloro restos de ni priplorinda.

Estas la doloro de l'Filo de la homoj, kiu volis senti kaj kovri nian krimon.

Estas la doloro de l'Filo de Dio, pro tio ke Li ne povis prezenti al Sia Patro la homon en la mistero de la Svitotuko.

Verkis: PAUL Claudel. Esperantigis: P. M. BROUWER.

KOREKTO.

In het artikel: „La Paskodato” is in de 10e zin van onder een gedeelte weggevallen. De zin moet luiden:

Por fiksi la Paskodaton por la jaro 1932a ni devas *dividi 1932 per 19, poste per 4 kaj fine per 7, dum ni devas* noti la restojn.